



Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago

Nº 12

Decembro, 2016

Karaj legantoj, jen estas por via atento la lasta ĉi-jara numero de nia bulteno "Saluton!". En ĝi vi trovos informon pri la sekvanta 2017, kiun UNESCO omaĝis al L. Zamenhof; vojaĝ-notojn de H. Becklin; beletran priskribon de "la vera rusa nature" el 1908 (kiu, fakte, ne pliboniĝis ĝis nun) fare de fama rusa verkisto A. Kuprin. Agrablan legadon!

—La Redaktoro



Ĉi jara festado de Zamenhofa Tago okazos la 11-an de Decembro kun partopreno de la Konsulo de Pola Respubliko en la kutima loko de la lastaj kunsidoj: Cobbler Square (Ŝuista placo), 1350 N. Wells St. Je via dispono estas senpaga parkejo, nur telefoni al Viktoro: (773) 344-2276. Kiel nia E-societo festis meze de 80-aj jaroj de la XX-a jarcento vi povas vidi de la apuda foto, kiu fiksas du membrojn: Janet Bixby kaj Les Kordylewski.

2017 – Jaro de Zamenhof de UEA

Dum la 38-a Ĝenerala Konferenco de Unesko, kiel ruĝa fadeno tra ĝiaj diskutoj iris la 70-jariĝo de Unesko kaj la realigo de la Celaro 2030 por Daŭripova Evoluigo, sed en sia ferma parolado la Ĝenerala Direktoro s-ino Irina Bokova ne povis ne tuŝi la lastatempajn terorismajn atakojn, interalie meze de la konferenca periodo en Parizo mem: *Tiu ĉi krima perfortaĵo trafas nin ĉiujn. Ĝi atakas ĉion, kio estas plej kara al ni: libereco, homaj rajtoj, la digno de ĉiu homo, nia sento de aparteno al la unusama homaro.*

Por esperantistoj la plej ĝojiga decido de la Ĝenerala Konferenco estas la envicigo de la 100-a datreveno de la morto de L.L. Zamenhof (14-a de aprilo 2017) inter 53 datrevenoj kun kiuj Unesko estos "asociita" en la periodo 2016-2017. Propono pri tio estis farita de Pollando, kun subteno de Germanio kaj Slovakio. Temas pri plia rekono de Unesko al Zamenhof post tiu okazo de la 100-a datreveno de lia naskiĝo, kiam li estis proklamita



unu el la grandaj personecoj de la homaro.

Universala Esperanto-Asocio, kiu havas oficialan statuson ĉe Unesko ekde 1954, estis reprezentita de kvar observantoj: René Triolle, François Lo Jacomo, Oleksandra Kovyazina kaj Nathalie So Yun Kesler. Hazarde samtage, la 5-an de novembro, kiam estis akceptita la aŭspiciado de la Zamenhof-datreveno, UEA havis tempon ĉe la budo por ne-registaraj organizaĵoj, ĉe kiu la UEA-representantoj povis disdoni informilojn kaj respondi demandojn pri Esperanto kaj la agado de UEA.

UEA lanĉas konkurson por kreado de paĝaro pri Zamenhof okaze de la Zamenhof-Jaro. La retejo celas enkadriĝi en la iniciatoj rilataj al la Zamenhof-Jaro, sed ankaŭ esti uzebla post 2017 kiel ĉefa informejo pri Zamenhof. Tial, ni antaŭvidas ke post la lanĉo de la retejo la laboroj daŭros la tutan jaron, sekvantan la okazaĵojn rilate al la Zamenhof-Jaro.

Samklubanoj en Krakovo de Hanso Becklin

Estis granda plezuro, ke ĉi-somere mi kaj mia edzino havis la eblon viziti nian samklubanon Les en lia bela hejmurbo, Krakovo. Kion ni faris kune? La unuan vesperon ni promenis en la urbcentro kaj rigardis la grandan hansan komercplacon. Meze de tiu ĉi placo estis konstruita la grandega "ŝtofhalo," kie la hansanoj vendis luksajn ŝtofojn en la 15a jarcento. En alia placo, malantaŭ unu el la grandaj preĝejoj frontantaj la komercplacon, mi kaj mia edzino ĝuis fumaĵitan polan fromaĝon. Poste, ni iris al tradicia restoracio proksime

al la placo, sed sufiĉe for de ĝi por ne esti plena je turistoj. Ni ĉiuj decidis manĝi la la tradician frandaĵon de la restoracio, batetenditan kaj patfrititan porkaĵon kaj boligitajn terpomojn. Ĉion ni manĝis kun ŝaŭco de fandita butero kaj aneto.

La postan tagon ni ĉeestis polalingvan diservon (kiun mi nur povis kompreni iomete pro mia ĝenerala scio pri la diservo) en la fama salminejo Wieliczka sude de Krakovo. Tiu minejo estis granda parto de la riĉiĝo de Krakovo en la epoko, kiam la ŝtofhalo konstruiĝis. ☞

Niaepoke ni aĉetas salon malkare en ĉiu butikoj, sed antaŭ la apero de friduoj kaj ĉiutaga internacia importado kaj eksportado, salo estis multekosta kaj tute bezonata por konservi la manĝaĵojn. 300 metrojn sub la surfaco de la tero, la vortoj de la pastro apenaŭ distris min pro la eblo vidi la



Hans kaj Les ĉe la Katedralo en Krakovo.

reliefajn kaj skulptaĵojn, kiujn elskrapis pias ministoj el la salo. Ili vere estis mirindaj—kaj la eblo resti unu horon en la sama vidinda loko sen turistoj permesis longajn rigardadojn. Irinte supren per antikva lifto, ni ĉiuj ĝojis, ke ni ne atendis en la longa vico por eniri la minejon kiel turistoj.

Post la frua diservo, mia edzino, kiu malsaniĝis pro malvarmaj ventetoj enirintaj la fenestron de la tranokta vagono el Prago al Krakovo, decidis reveni hotelen kaj enlitiĝi. Tio permesis la esperantistojn paroli Esperanton dum horoj en la kastelo Vavelo, la iama reĝa kastelo de Polujo. Estis sunplene tiun tagon, kaj la promenado tra la urbo kaj sur la monteton plaĉis al ni. Tiu ĉi historiisto amis la ledan tapeton en la kastelo, la faman pentraĵon fare de Leonardo el Vinci, kaj la brilajn tapiŝojn ene. Sed estis eĉ pli plaĉe paroli Esperanton kaj malrapide tagmanĝi bongustan polan manĝon kun bona amiko, aŭskultante lian vivhistorion kiel loĝanto de Krakovo.

Gastronomia Fino

Aleksandro Kuprin (1870-1938)



Mi memoras, antaŭ kvin jaroj mi kun verkistoj Bunin kaj Fedorov venis por unu tago ne Imatran. Ni revenis malfrue nokte. Ĉirkaŭ la dekunua horo la trajno haltis ĉe la stacidomo Antrea, kaj ni eliris por manĝeti.

La longa tablo estis kovrita per varmaj pladoj kaj malvarma manĝetoj. Tie ĉi estis freŝa salmaĵo, rostigita truto, malvarma rostita bovaĵo, iuj ĉasbirdoj, bongustegaj hamburgeretoj kaj similaj. Estis purege, frande kaj elegante. Kaj tie ĉe la tabl-randoj mont-leviĝis teleretoj, kuŝis stakoj de tranĉiloj kaj forkoj, estis metitaj korbetoj kun pano.

Ĉiu alproksimiĝis, elektante kion li ŝatis, manĝante kiom li volis, poste aliris al la bufedo kaj propravole pagis pro vespermanĝo akurate unu markon (tridek sep kopekoj). Neniu kontrolo, neniu malkonfido. Niaj rusaj koroj, tiel profunde alkutimiĝantaj al la pasporto, policejo, deviga prizorgo de maljuna domzorgisto, al ĝenerala fraŭdo kaj suspekto, estis tute subpremitaj per vasta reciproka fido.

Sed kiam ni revenis en la vagonon, nin atendis bela bildo en vera rusa ĝenro. Fakto, ni vojaĝis kun du entreprenistoj pri ŝton-laboro. Ĉiuj konas tiun tipon de kulako de Meŝĉovska distrikto en Kaluga provinco: la larĝa, brila, vangosta ruĝa buŝumo, ruĝa hararo tordanta el sub ĉapo, maldensa barbo, fripona rigardo, kvinkopeka pieco, arda patriotismo kaj malestimo al ĉio ne-rusa – unuvorte, bone konata vere rusa vizaĝo. Oni devis aŭskulti, kiel ili primokis povrajn finoj.

– Jen stultuloj, kiel idiotoj. Diablo scias, kiel ili estas malsaĝaj! Ja mi, se oni kalkulu, manĝis ĉe ili, ĉe tiuj fiuloj, je pli ol tri rubloj... Ho, bastardoj! Oni

Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Randy Ream
1835 N. Natoma Ave., Chicago, IL 60707
773-262-7738
www.esperanto-chicago.org

Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski
Vicprezidanto – Randy Ream
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk
Sekretario – Tina Seastrom
Kasisto – Karlo Gunn
Membro – Hans Becklin

MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: \$40 jare;
Familia membro: \$30,
Regula: \$20
Studento aŭ pensiulo: \$10.

Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website. Gifts are welcome also.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer, Charles Gunn 828 S. Ada St, Chicago IL 60607-4105

SEKVANTAJ KUNSIDOJ

1350 N. Wells St., Ŝikago. Bonvenon!
Apudas stacioj: Sedgwick (Bruna linio) kaj Clark/Division (Ruĝa linio). Por senpaga parkejo bv telefoni al Viktoro: (773) 344-2276. Vi rajtas preni vian ŝatatajn ne-E-amikojn, manĝaĵojn kaj trinkaĵojn (dolĉakvon, bieron, vinon ktp).

11an de Decembro 12:00-4:00pt – Zamenhofa Tago

22an de Januaro 7:00-9:00pt – Kaliforniaj Vitejoj

malmulte batas ilin, filojn de hundino!
Unuvorte – la finnaĉoj.

Kaj la alia daŭrigis, sufokante de ridoj;
– Kaj mi ... intence forŝtelis glaseton kaj poste kraĉis sur la fiŝon.

– Do ili, bastardoj, meritas tion! Oni malobeigis anatemojn! Oni devas teni ilin en ordo! 1908 –*Esperantigis Araneo*

